# Nova specimeno de la Internaciaj Ekzamenoj

## Skriba parto
**Meza nivelo**

Poentoj: 100 Sukceslimo: 60% Tempodaŭro: 3 horoj

La nun publikataj specimenoj de la ekzameno celas informi vin pri la aktualaj postuloj, doni eblon por orientiĝi pri la ekzamenaj taskoj.

**La specimenojn iu ajn rajtas uzi por propra studado, instruado, ekzercado, ks, tamen neniu rajtas uzi ilin kiel aŭtentajn ekzamenojn nek disdoni iun ajn atestilon, ĉu nome de ILEI, de iu instruisto aŭ lernejo, de iu organizaĵo, aŭ de alia instanco. Tio estas malpermesata!**

**La skriba parto de la ekzameno konsistas el la subaj 4 partoj:**

1. Lega kompreno
2. Eseo
3. Aŭskulta kompreno
4. Kulturaj konoj

Aldono de la redaktoro:

- Por ĉiu tipo vi trovas specimenon, kiuj komenciĝas ĉiam sur nova paĝo.
- Atentu la instrukciojn kaj la indikon pri la disponebla tempo kaj atingeblaj poentoj.

- Ni ne donas la solvojn kaj bonajn respondojn de la demandoj, bonvolu ne peti ilin de la redaktoro. Ni pensas, ke se vi scias la aferojn, vi ne bezonas konfirmon. Se vi malcertas pri io, faru esplorojn mem, ja la tiel « perlaboritaj » konoj restas en la memoro longe.

## 1. Lega kompreno

*Legu la sekvan tekston atente kaj respondu la demandojn sur aparta folio.*
*[Disponebla tempo: 45 minutoj*

**VIRINAJ OKUPOJ**

Transe de la nevidebla [rivero], ĉe la piedoj de la altaj dunoj susurantaj pro la nelaciĝanta vento, kiu ludas per la sableroj, la verdanta palmareto silente sunvarmiĝas kiel pacema lacerto. Tie unutone fluas la vivado, sen ĝojo, sen zorgo. La sola agemo observebla estas tiu de la virinoj.

Sur terpecoj ĉirkaŭbaritaj per spitaj dornujoj, virinoj kun belaj kaj nudaj brakoj prilaboras sensukan grundon. Ili ĉiuj surportas samaspektan robon el blua katuno, longan kaj senmanikan tunikon laŭ la antikva modo, kaj sur la kapo plurkoloran tukaĉon. Senbrue sed diligente la bluaj siluetoj superkampe kliniĝante skrapas, irigacias, semas, plantas, rikoltas la grenon, ĝin draŝas kaj enamforigas. Apude, surtere trenante sian barbeton, kelkaj malgrasegaj kaprinoj serĉadas duban herbaĉon, dum piedligita azeno blekadas pro enuo kaj mizero.

Post tiu ĝardenludo la virinoj preparas la familian kuiraĵon, ordinare griaĵon, malofte viandon, kun selakto. Ili ne manĝas kun la viroj, sed ĉe aparta flanko, nur post kiam la mastro plaŭde ruktis, tiel pruvante ke li plensatas.

Ili sin provizas per brulligno el tamariko, ofte je plurdek kilometroj meze de la Grandaj Dunoj. Dum tiu ekskursado, kun surkapa ŝarĝo de kvindek kilogramoj, kelkaj el ili mortas pro trostreĉo de siaj fortoj. Ne tre grave estas, ĉar virino pli malmulte kostas ol dromedaro aŭ azeno, kaj se maljuna estas la forpereintino, oni kompreneble profitas el la ĵusa okazo por aĉeti belulineton pli logan kaj fortan.

En marĉeto ili lavas la tolaĵon per siaj piedoj kvazaŭ polkante. Dum tiu absorba laboro niaj sinjorinoj klaĉadas kiel klukantaro da monduminoj ĉe tekunveno en Ritz-Hotelo. Tie oni komentas ĉiujn faktojn kaj novaĵojn de la regiono; oni neniun indulgas, nenion forgesas. Senbride galopas la langoj laŭ takto de la lertaj moviĝoj de la piedoj, kiuj premas, tordas, knedas la blankan tolaĵon. Krome ili ofte naskas, kaj mamnutras nombrajn infanojn, kiujn ili surdorse ĉien kunportas kvazaŭ naturan ĝibon. Ekde la demamiĝo la buboj senhelpe, senzorge kreskas kaj memstare sin edukas kun la kaprino, la hundo, la kokinoj kaj kelkaj centoj da viglaj muŝoj….

Kaj la viroj?… Kie kuŝas la viroj, vi demandas?… Mi ne scias, ilin oni ne vidas. Kaŭrante en la varma ombro ili kviete konversacias kaj rigardas kreski la daktilojn, antaŭtaksante la rikolton kaj dronante en senfinaj revoj.

Paradiza lando, benita lando, kie oni majstre scias ĝui la veran vivodolĉon…

—El *Vagado sub palmoj,* Jean Ribillard

## TASKOJ

***A.*** *Trovu en la teksto sinonimojn de jenaj esprimoj kaj skribu ilin en la spacoj.*

1. praepoka ____________________
2. sekan ____________________
3. purigas ____________________
4. akvumas ____________________
5. mortinto ____________________
6. laboreme ____________________
7. vigle dancante ____________________
8. ĉifonon ____________________

Atingeblaj poentoj: 8

***B.*** *Respondu la demandojn* ***per kompletaj frazoj.*** *[Poentvaloro sekvas.]*

1. Krom prizorgado de la grenkampoj, kiuj aliaj gravaj aferoj okupas la virinojn? [4]
2. Kiun metaforon uzas la verkinto en "senbride galopas la langoj"?
   Kion li volas diri? [4]
3. Ĉu la virina laboro estas juste taksata en tiu socio? Pravigu vian respondon. [7]
4. Kio en la teksto eventuale indikas ke ankaŭ la virinoj "scias ĝui la veran vivodolĉon." [7]

Atingeblaj poentoj: 22

(Sume por ambaŭ partoj : 30 poentoj)

## 2. Eseo

*Verku tri-paĝan (ĉ. 600-vortan) eseon pri* ***unu*** *el la sekvaj temoj:*

1. La ŝanĝiĝanta tereno de Esperantio
2. Kiel utila estas la Akademio de Esperanto?
3. Diverseco: ŝanco, ne minaco
4. La plej maltrankviligaj fortoj en la nuna mondo

*La ekzamena komisiono aljuĝos po 10 poentojn por lingva ĝusteco, idea enhavo, kaj stilo.*

[Disponebla tempo: 1 horo]

(30 poentoj)

## 3. Aŭskulta kompreno

*La kandidato devas aŭskulti du sonbendigitajn aŭ laŭtlegatajn tekstojn. La tekstojn unu el la ekzamenantoj legas dufoje kun triminuta paŭzo, ambaŭfoje ili estas malrapide legataj (proksimume 80 vortojn minute)*. *Eblas fari notojn dum la aŭskultado.*
*Kvankam ĉi tie estas prezentata specimeno en skriba formo, dum la ekzameno la kandidato* ***ne rajtas vidi la tekstojn****.* ***Ankaŭ vi ne legu****, sed prefere trovu iun kiu legos ilin por vi!*

***3.1.***
*Pri la unua teksto la kandidato devas respondi kvar demandojn, kiujn eblas legi antaŭ la aŭskultado. [Disponebla tempo: 15 minutoj]*

En 1986 mi vojaĝis kun dek esperantistoj el Israelo al la Universala Kongreso en Beijing.

La UK en Beijing por mi estis unu el la plej memorindaj, kaj pro la beleco de la lando kaj la urbo, kiujn mi kaj mia edzino tiam unuafoje vizitis, kaj pro la amika akcepto de la esperantistaj gastigantoj. En la oficiala antaŭkongreso, same kiel dum la kongreso kaj dum postkongresa ekskurso, ĉie imponis al ni la kora kaj amikeca akcepto kaj helpemo de lokaj esperantistoj. Ĝis nun unu el miaj plej popularaj lumbildoj pri Espranto estas tiu, kiu montras grupeton de israelaj esperantistoj sur la Granda Muro.

Por ni, la vojaĝo tra Ĉinio havis tri pintojn: la Granda Muro norde de Beijing, eble la plej fama simbolo de Ĉinio en la okcidenta kulturo, la terakota armeo en Xi'an, mirinda arkeologia atesto pri glora pasinteco, kaj la luna pejzaĝo de la rivero Lijiang ĉe Guilin, unu el la plej belaj naturaj belecoj, kiuj ja abundas en Ĉinio.

En 1986, vizito de israelanoj en Ĉinio estis tre malofta okazo, kaj tiu vizito, kiu fariĝis ebla dank' al Esperanto, estis tiom speciala ke aperis pri ĝi artikolo en unu el la ĉefaj tagaj gazetoj de Israelo.

[—Amri Wandel, *El popola Ĉinio 6/2000*]

**DEMANDOJ:**

**Respondu per kompletaj frazoj!** [Poentovaloro sekvas ĉiun demandon.]

1. Pro kio estis la UK en Beijing (por la preleganto) unu el la plej memorindaj? [2]
2. Kiuj estis por la vizitantoj la tri ĉefaj vidindaĵoj? [3]
3. Kiel la preleganto karakterizas la terakotan armeon en Xi'an? [2]
4. Kiu okazis en Israelo kiu klare montras ke vizito de israelanoj al Cxinio en la 80-aj jaroj estis vere nekutima afero? [3]

(10 poentoj)

**3. 2.**

***La dua tasko*** *estas aŭskulti aldonan tekston pri la sama temo kaj resumi ĝin en ĉirkaŭ 105 - 200 vortoj. La kandidato rajtas aŭskulti la tekston dufoje kaj rajtas fari notojn dum la aŭskultado. Estas triminuta paŭzo inter la du aŭdigoj, dum kiuj la kandidato rajtas eklabori. [Disponebla tempo: 30 minutoj]*

Nun eble mi povas sugesti al vizitantoj al Israelo tri similajn pintojn, kvankam ja tute aliajn:

— Jerusalemo, 4000-jara urbo sankta al tri religioj, kies muroj atestas pri la pasinta gloro, kies preĝejoj, moskeoj kaj sinagogoj plena je la unika etoso de sankteco, kie la buntaj merkatoj kunfandiĝas kun la modernaj aĉeto-centroj, muzeoj kaj universitato.

— La Morta Maro, la plej malalta loko en la mondo, kun unika kuraca efiko de la sala akvo, kie oni povas flosante legi gazeton, sed ankaŭ la Judea dezerto, natura perlo, kie profundaj dezertaj kanjonoj kaŝas rokajn basenojn, kie la impona monto de Massada kaj ĝiaj mirindaj elfosaĵoj rakontas pri la heroa morto de tricent judaj familioj, kiuj dum tri jaroj kontraŭstaris la legiojn de la Romia Imperio kaj fine preferis la morton al sklaveco.

— Tel-Avivo, kiu aĝas malpli ol cent jarojn, eble pli ol ĉiu alia urbo reprezentas la naskiĝon de Israelo: ĝi kreskis el la sablo, inter dunoj kaj maro, kaj dum malmultaj jardekoj fariĝis la ekonomia, kultura kaj distra centro de Israelo. "Urbo senpaŭza" nomas ĝin la enloĝantoj, kaj vere tia ĝi estas: tage ĝi estas la komerca kaj ekonomia koro de la ŝtato, kaj nokte ĝis matene ĝi transformiĝas al paradizo por nokta vivo: teatroj, aĉetum-centroj, kafejoj, trinkejoj, dancejoj, restoracioj ĉiuspecaj… kaj somere ankaŭ la stratoj, kaj precipe la marbordo logas amasojn da homoj.

Al tiuj pintoj aliĝas dekoj da kulturaj, religiaj, arkeologiaj kaj naturaj juveloj. Israelo estas ankaŭ etnologie kaj socie bolanta mikspoto, kie miksiĝas diversaj popoloj, kiuj lernas kunvivi. La tuta lando estas ja vivanta etnografia muzeo.

Sendube vizitantoj multe lernos kaj vidos—pri la lando, pri ĝia popolo, pri ĝiaj kulturaj kaj naturaj trezoroj, pri ĝia kvarmil-jara historio kaj pri ĝia ŝtorma kaj ekscitiga moderna historio, kiu estas forĝata ĉiutage.

[—Amri Wandel, adaptita de *El popola Ĉinio 6/2000*]

(10 poentoj)

## 4. Kulturaj konoj

*Plenigu la spacojn en la sekvaj frazoj per la taŭgaj informoj.*
[Disponebla tempo: 30 minutoj]

1. La unua Universala Kongreso de Esperanto en azia lando okazis en 1965 en la urbo ___________________.
2. Virina ĝenerala sekretario de UEA fine de la 90-dekaj jaroj estis ___________________.
3. La fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda, kies "vortoj" estis poste eldonitaj libroforme, estas ___________________.
4. La t.n. korifeo de la budapeŝta skolo, verkinto de originalaj poemoj kaj prilingvaj verkoj, brila tradukisto, kaj ĉefredaktoro de "Literatura Mondo" estas ___________ ____________________.
5. Tre fekunda nuntempa verkisto, ofte aktiva en Baltio, kies beletraj kontribuoj inkluzivas la verkojn *Memori kaj forgesi, Sed nur fragmento,* kaj *Falantaj muroj* estas ___________________.
6. Verko kompilita de L. L. Zamenhof kaj eldonita en la jaro 1903, kiu "povos servi al ĉiuj kiel modelo de esperanta stilo" estas ___________________.
7. Vaste konata gazeto, fondita de Teo Jung en la jaro 1920 kiel "Esperanto Triumfonta" kaj nun sub la redakcio de LF Koop, estas ___________________.
8. La ofte menciita 15a regulo de Esperanto rilatas specife al ____________________ ___________________________________.
9. Ĉeĥa verkisto kiu kelkverke famigis sian naskiĝurbon kaj multe eksperimentis per la lingvo, serĉante pli taŭgan kaj pli elastan lingvaĵon speciale por vivigi romanojn estas ___________________.
10. Nuntempe, ĉiutaga radio-elsendo pere de la Interreto originas en la urbo ___________________.
11. La eŭropano kiu dum multaj jaroj estas la komisiito de UEA por Afriko estas ___________________.

12. "La celon ni plenumas, la celo nin konsumas" estas la finaj vortoj kaj la ĉefa temo de la klasika verko ____________________, kies verkinto estas ____________________.
13. Lastatempe reviziita, la plej ampleksa vortaro de la lingvo Esperanto, ĉefredaktita de G. Waringhien kaj M. Duc Goninaz, eldonita de SAT, estas ___________________________.
14. Konata dokumento kiu traktas pri sep "principoj…esencaj por justa kaj efika lingva ordo", kiun oni vaste diskonigis post ĝia prezentado dum la UK en 1996, estas _____________________.
15. La rakontoj en la klasikaj verkoj *Bakŝiŝ* (Newell) kaj *Vagado sub palmoj* kaj *Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* (Ribillard) priparolas ĉiutagajn aferojn en la kontinento ____________________.
16. La nova organizaĵo kiu pro financaj kaj juraj kaŭzoj transprenis la rolon de UEA inter la jaroj 1938 kaj 1948 estis ____________________.
17. La titolo de la historia "studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto", verkita de Ulrich Lins, estas ____________________.
18. Fondaĵo "Konto Espero" de UEA havas kiel specifan celon helpi laŭeble esperantistojn kiuj suferas pro ____________________.
19. Fama kaj longtempa kultura Esperanto-domo sudokcidente de Parizo estas ____________________.

(20 poentoj)